

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://storm.prohosting.com/jesuo/k56.htm>

<http://www.iespana.es/esperanto/k56.htm>



**Tom Jobim, grava
muzikisto brazila,**

N° 56

Novembro/decembro 2002

Kajeroj



el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezas Martínez**,
c/ Jabonerías, 6-3^oD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Redaktoro: **Jesuo de las Heras**,
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Grava noto: de aprilo la estraro demistiis. Nur
Prezidanto kaj Redaktoro
provizore oficas.

Pretigas la Kajeron:

Provokorekto: **José Pina Tuells**,

Redakto: **Jesús de las Heras Jiménez**.

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nova konto
de La Caixa n-ro 2100 4455 71
0200022454. Sen aldona kosto. La abono
kostas 6 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

Kovrilo: Tom Jobim estis plej grava
muzikisto de moderna Brazilo. En paĝo 7-a
vi trovos pli pri li.



Enhavo

Redaktore	3
Balotado	3
Informoj de la prezidanto	4
Esperantismo	5
Dek du paŝoj al sana vivo	6
Tom Jobim	7
La hispana vortaro	9
Fondo de grupo SAT-en-Hispanio	10
SATeH kaj HALE	11
La faraono	12
Statuto de SAT	20

Kajeroj el la Sudo regule interŝanĝas kun:

- 1 **Esperanto**, redaktata de Stano Marček,
 - 2 **Monato**, de Stefan Maul,
 - 3 **Juna Amiko**, de Geza Kurucz,
 - 4 **Sennaciulo**, de Krešimir Barkovič,
 - 5 **SAT-Amikaro**, de Jean Selle,
 - 6 **Internaciisto**, de Luis Serrano.
 - 7 **La Kancerkliniko**, de Ĵak le Paül,
 - 8 **Litova Stelo**, de Petras Čielauskas,
 - 9 **Liberecana Ligilo**, de Jakvo Schram,
 - 10 **Laŭtel**, de C. Baudé,
 - 11 **La Migranto**, de Antje Noordewier,
 - 12 **SLEA-Infornilo**, de P. Persson,
 - 13 **Naturista vivo**, de Erovín Fenyvesi,
 - 14 **La verda proleto**, de komitato,
 - 15 **La Juna Penso**, de Vinko Markov.
- Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



Ne subskribitajn
artikolojn verkis la
redaktoro.

Oni povas
reprodukti
artikolojn,
kondiĉe ke
oni citu la
originon.

Ni ne korespon-
dos pri ripetitaj ar-
tikoloj. Tamen, ni
klopodos publikigi
ĉiun artikolon kies
enhavo estas intere-
sa kaj ne mis-traktas
iun ajn personon.

Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas
la aŭtoroj mem, ne la
redakcio.

Redaktore:

Lastan monaton mi *finfine* pretigis la numeron de julio de ĉi tiuj **Kajeroj**. Kutime estas monatotrio antaŭ publikigo de la sekvanĉa, sed ĉi foje ni devas



denove veni antaŭ vi, legantoj, ĉar ni diris en aprilo, ke la estraro de HALE tiam demisiis, kaj la prezidanto malfermis tempoperiodon por ke tiuj HALEanoj, kiuj tion fari decidu, povos kandidatiĝi al prezidanteco aŭ nova estraro. Ni diris, ke la tempoperiodo estas de aprilo al la unua de oktobro. Post tiu dato, ni publikigos --ni diris--, la kandidatiĝojn, kaj poste ni dirus pri la balotmaniero. Tio okazus, se ĉiu irintus regule, en la *Kajero* de januaro. Sed la numero de julio iĝis oktobra, kaj anstataŭ pardoni al vi, leganto, tiun de oktobro, ni preferas prezenti al vi ĉi tiun *oktobran*, kiu vere decembrigiĝis.

De la aperigo de nia antaŭa numero kelkaj aferoj okazis. Mi eksciis, ke oni intencas krei novan liberecanan Esperanto-asocion en Hispanio, rilatanta al SAT per la konvencio de Gotemburgo. Mi salutats tiun iniciaton elkore kaj varme. Por ke ne ekzistu erarigo, la novan asocion oni nomos *SAT-en-Hispanio*. Ĝi estos maldekstrema asocio kaj—oni asertis al mi—klopodos plenumi la celojn de SAT asignitajn al ĝi, kaj ne kritiki SATn. Mi ne ankoraŭ konas la ceteran regularon de ĝia statuto, sed tamen mi opinias, ke tio estas bona ideo, kaj pro tio, mi jam petis aliĝi al tiu nova asocio, kaj senpacience atendas respondon de la responsuloj de la plej nova Esperanto asocio de Hispanio.

Tamen, mi ne komprenas, ke se estas tiom aktivaj esperantistoj laboristaj en Hispanio, ke neniu el ili konsideris sendi kandidatiĝon al Prezidanto de HALE aŭ al mi mem, kiel petite de ni en la numero 54-a, en aprilo, por ke estu, almenaŭ, dua kandidatiĝo al estraro de HALE. Mi ne ŝatas kredi, ke mi ne havas anstataŭulon, mi

ne deziras esti unika kaj nekabeigebla. Min ne ĝenas tio, kion mi faras por Esperanto, sed, tamen, mi konscias, ke devas esti aliaj homoj, kiuj faras mian taskon pli bone kaj efike ol mi faras. Kaj, aldone, ili povus fari ĝin pli pace kaj kontentige al aliaj homoj. Sed, tamen, mi daŭrigos mian agadon ĝis kiam oni sukcesos anstataŭigi min...

Jesuo

Balotado en HALE

Kiel dirite en *Kajeroj* n-ro 54-a, la 1-an de oktobro **finis la periodo por kandidatiĝi al estraro** de HALE. Ni atendis pluan monaton. Nur unu kandidatiĝon oni sendis al ni. Jenas:

Prezidanto: Juan Antonio Cabezas Martínez.

Vicprezidanto: Pedro Ruiz García.

Sekretario: Jozefo Pina Tuells.

Kasisto: vakas.

Redaktoro: Jesuo de las Heras.

La **anoj** de HALE **bonvolu sendi sian voĉdonon al Sekretario** de la Asocio **antaŭ la 15-a de decembro** de 2002. Rezulton oni publikigos la venontan *Kajeroj* 57-an.

Jen la **programo** de la kandidatiĝo:

- 1^o: Pli grandigi la nivelon de interna demokratio en HALE, ebligante la voĉdonon de legantoj nemembraj, kaj ties partoprenadon en la vivo de la asocio.
- 2^o: Ne plialtigi la kotizon.
- 3^o: Pretigi novan kongreson.
- 4^o: Krei liston da aliĝintaj legantoj, kiuj povos voĉdoni.
- 5^o: Krei virtualan kongreson.
- 6^o: Dorloti absolutan intelektan liberecon.
- 7^o: Graviĝi la Premion *Tago de Zamenhof*.
- 8^o: Ĉar ĉi foje ne estas konkurenco, ripeti balotadon la venontan monaton de novembro 2003, ebligante anojn jusalvenontaj estrariĝi kaj daŭrigi la laboron, ĉar la nuna statuto postulas, ke kandidatoj estu almenaŭ unu jaron en HALE.

Informoj de la prezidanto



Estimataj Samideanoj!

La libereco, kiu prezidas nian asocion kaj nian propran kritikon, permesas ke en la una paĝo de nia bulteno *Kajeroj el la Sudo* aperas la peto de SATanoj, kiuj ne estas HALEanoj, kiuj petas mian demision kaj tiun de la estraro.

Tio estas nia sento, tio estas nia ideo: libereco por kritiki eĉ nin mem.

Antaŭ kelkaj monatoj aperis artikolo de falangisto kaj komencis kampanjo kontraŭ Hale. Neniu kritikis la argumentojn de la falangisto, sed atakis Halen kiel faŝisman. Ni ne estas faŝismaj, sed ni amas la liberecon kaj ĉiam estas unue la libereco, la malamikoj de la libereco atakis kaj diras aferojn kiuj ne estas veraj.

Kontraŭ la malamikoj de la libereco mi respondas: libereco.

Mi petis la ĉefredaktoron de *Kajeroj el la Sudo*, ke en la unua paĝo de nia magazino aperu la peton de tiuj esperantistoj, kiuj ne estas HALEanoj.

Alia argumento, kiu uzas tiujn esperantistoj, estas, ke HALE batalas kontraŭ SAT.

En *Sennaciulo* aperis frazoj de samideano Jakvo kontraŭ HALE kaj mi ne kredas ke SAT batalas kontraŭ HALE. La kritiko estas bona kaj permesas respondi, kaj permesas plibonigi la asocion. Mi ne volas asocion, kiu ne faras kritikon. Kiam ne ekzistas la kritiko, aperas faŝismo.

La frazoj de Jakvo permesas al mi respondi kaj plibonigi la asocion.

Finis jam la periodo prezenti kandidatiĝon, kaj pro tio, ke ne estas alia alternativo, ni rekandidatiĝas. Jen mia programo: 1 pli da demokratio interna en la Asocio, 2 ni organizos kongreson de HALE, kaj 3 ni ne plialtigos la kotizon.

Malmulte da asocioj povas fari tion: senpage lokiĝi la magazinon en Interreto kostas monon, sed ni ne plialtigos la kotizon pro tio. Kaj fine mi klopodos plialtigi la internan demokration.

Haleanoj, ĉiam je via dispono!

Ĝis baldaŭ,

*Johano Antonio
Cabezas Martinez*

Esperantismo

Ni diru, ke ni parolas pri morto. Kio ne mortas en vivo? Ĉiu tagon mortas floro, amiko, sento, bonvolo, iluzio... Kion fari? Ĉu tio estas naturo de aferoj?

Jĝi vivulo ja estas hazarda aventuro. Milionoj da vivomanieroj povintus okazi anstataŭ tiu nia. Nia individua esto povintus estis ĉia alia. Ne estis, tamen. Sed tio dependis de multe da kondiĉoj, kiujn ni mem ne povus kontroli, se ni povus reiri al tiu momento magia, kiam ni estis konceptitaj. Sed ni, vere, devas akcepti, ke ni ja estas ĉi tie. Ĉu por ĉiam? Ni atentu tion, kion oni celas diri, kiam ni diras ĉiam. Ĉu nian tutan vivon? Certe jes: tiu-sence, ni ja estas eternaj. Ni konsideru, ke universo komencis kiam mi naskiĝis, kaj la universo mortos ekzakte tiam, kiam ni mortos. Ĉu tio estas multe da tempo? Eble. Tio dependas, aldone, el tio, kion ni faras dum ke ni vivos, kaj kiel intense ni vivos.

Ĉu ni vivos milojn da jaroj, ĉu almenaŭ centoj da ili, mi vere dubas: tian eternecon ni ne atingos. De kie mi scias? Nu, tiuj, kies universoj jam kreiĝis kaj pasis ne atingis multe pli ol unu jarcento, do kial ni povus daŭri pli? Mi dubas. Kelkaj el tiuj estuloj, tamen, de mi referencataj nun, sufiĉis notigi sin tiom multe, ke multe da jaroj post iliaj mortoj oni ankoraŭ parolas pri ili, kaj eĉ ili mem parolas al ni: Mihaelo Servanteso, Ĉon Kenedi, La Markiso de Sade, Mata Hari, Adolfo Hitlero, Bakunin, Kaŝimir Bein', kaj tiel plu.

Jes, de kelkaj jaroj post la morto de homo, perspektivo ŝanĝiĝas kaj la homo koncerna estas bonulo aŭ malbonulo, revulo aŭ senculo, laŭ nia eltrovo kaj persona sperto, se ne profito.

En tiu grundo ni povas kompreni, ke la lastaj aferoj okazintaj en nia etoso, ververe ne gravas. Ĉu estas signife, ke kelkaj esperantistoj kreu novan asocion laboristan en Hispanio, pro tio, ke ili sentas, ke en HALE oni kritikas akre kaj insulte la ĉiam sanktan organizon SAT-n? Kompreneble, tio povas havi almenaŭ du legadojn.

Unuflanke, oni povas konsideri, ke tiuj herezuloj, kiuj alproprigiĝis la Liberecanan Esperantan Asocion de Hispanio, meritas, ke oni forlasu ilin, ke oni lasu ilin solaj, tiel, ke ili lernu, ke pri laboristoj oni ne ludas. Oni respektu ilin ĉiam, kaj oni kreu dogmon el sendogma asocio laborista, progresiva, maldestrema, tutmonda kaj esperantisma. Aŭ ĉu sole esperanta?

Aliflanke, oni povas konsideri, ke en Hispanio la ideo pri progresisma movado esperanta trovis tiom favoran grundon, ke ne sufiĉas unu LEA. Do, oni kreis duan. De unu flanko estas la tradicia Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj, kaj de la alia ĵus aperonta la SAT-en-Hispanio. Oni ne trompu sin: tiu lasta estas SATa asocio, laŭ kelkaj konsideroj, pli SATa ol SAT mem. Tion mi eltiras de tio, ke dum ke mi facile povus aliĝi al SAT rekte, ne estas tiom facile aliĝi al SAT-en-Hispanio!

Sed mi deziras al tiu nova asocio bonan naskiĝon kaj marŝadon, bonan sanon, kaj longdaŭran vivon. Eble iam historio diros, ke estis oportune, ke ĝi naskiĝis. Eble ne. Sed mi elkore deziras, ke ili faru ĉion pli bone kaj pli oportune, pli brile kaj pli esperantisme, ol ni HALEanoj iam sukcesis fari.

Rekamaradece,

Jesuo

Dek du paŝoj al sana vivo

de *Joan Borysenko*

- 1 Akceptu, ke vi ne povas kontroli la eksterajn cirkonstancojn de via vivo, sed ke vi povas kontroli viajn respondojn al ili. Rekadru viajn respondojn, por ke ili konduku al pozitivaj agadoj kaj sentoj.
- 2 Bona sano dependas kaj de fizikaj kaj de mensaj faktoroj: do ĝuste manĝu, ĝuste ekzercu kaj meditu regule.
- 3 Pensu, ke vi estas sana: ne pensu, ke vi estas malsana.
- 4 Ŝanĝo estas la sola konstanta fakto en la vivo, do pro tio malfermu vian meson al ŝanĝo en via vivo. Ne kontraŭstaru al la ŝanĝo aŭ plendu pri ĝi.
- 5 Via kredoj estas pli potencaj ol vi scias. Konseiu pri ili. Admonu ilin, kaj estu certa, ke ili estas pozitivaj. Se ne, ŝanĝu ilin.
- 6 La sola vojo por eskapi de streĉado, timo aŭ dubo, estas rekte alfronti la kaŭzojn de tiuj emocioj.
- 7 La du fundamentaj emocioj estas timo kaj amo. Ĉiam elektu amon.
- 8 Kiam ĉeestas elekto inter esti justa aŭ esti en paco, elektu pacon.
- 9 Akceptu vin mem kia vi estas. Ĉiuj havas mankojn. Ĉiuj estis vunditaj. Ĉiuj estis devintaj alfronti amarecon. Neniu estas perfekta. Ni estas tiaj, kiaj ni estas.
- 10 Kiam vi estas kolera aŭ vi sentas rankoron pri iu, ĉesigu la emociojn, kaj praktiku pardonon —inkluzive de pardono al vi mem.

Ĉu la *knabino de Ipanema*?



11 La vivo neniam ĉesos doni al ni instruajn lecionojn. Sana homo estas ĉiam malfermita al la lernado kaj al la malkovro. *Kiam la lernanto estas preta, la instruisto aperas.*

12 Estu pacienca. Esti pacienca ne signifas subpremi senpaciencon, sed pli ĝuste havi zorgan atenton al la procezoj ĉirkaŭ vi, kaj ne al la zorgo pri rapida efektiviĝo de la produktoj de tiuj procezoj.

Al ĉi-supraj paŝoj, unu pluan oni povas aldoni: amu kaj traktu kun respekto vin mem.

El *Naturista Vivo* 68-a

Tom Jobim

Kiam mi vizitis Brazilon okaze de la lasta Universala Kongreso, ŝokis min konstati, ke ne multaj brazilanoj bone konis la muzikon de Heitor Villa-Lobos, la plej granda --laŭ tio, kion mi ĉiam studis kaj konis-- muzikisto de tiu vasta lando. Mi ludis *Choros n-ro 2-an* al junulino, kaj kvankam ŝi diris, ke ĝi estas familia al ŝi, ŝi ne povus diri kies muziko ĝi estas. La patrino, de alia generacio, kaj pli klera, evidente, diris al mi, ke ne multaj homoj en Brazilo nun konas pri Villa-Lobos, kaj certe ne la junuloj. Mi ne scias, ĉu tio estas maljusta ĝeneraliĝo pri la afero, sed tio vere surprizis min.

Sed tute aliel okazas pri Tom Jobim. Li pruntedonis sian nomon al la plej granda flughaveno de Rio, kaj eble pro tio lia nomo ne iras senrimarkata. Ni jam konis pri Heitor Villa-Lobos en nia numero 36-a, Sed, kiu estis tiu Tom Jobim?

La nomo de Antonio Carlos Jobim, mallonge Tom Jobim, estas ligita al vortoj *Bossa Nova*, la ondo nova, kiu venis en la muziko brazila —kaj monda— de la jaroj 50-aj de la lasta jarcento. Li naskiĝis la 25-an de januaro de 1927 proksime de tiu mirinda parko, Tijuka, en Rio de Janeiro, el gepatroj Jorge Jobim kaj Nilza Brasileiro. La patro mortis ok jarojn poste, kaj li kreskis kun patrino, duonpatro Celso Frota, kaj fratino Elena. Kiam li estis deksesjaraĝa, li komencis lerni ludi pianon, sed oni igis lin komenci studi en universitato arkitekturon, je 1946. Sed kiam li estis dudekjaraĝa, li forgesis tion favore al muzika kariero. Ĝi komencis kiel pianoludisto en kabaredoj, sed baldaŭ li registris diskojn je *Continental Records* je 1952, kiam lia filo Paŭlo jam naskiĝis de lia edzino Theresa.

Kvar jarojn poste li laboris kiel artisman direktoron por alia kompanio (Odeon), sed, plej grave, li komencis kunlabori kun poeto

Vinicius de Moraes, kaj ili produktis la sukcesan kaj gravan muzikon por la teatraĵo *Orfeo de la Karnivalo*, kiun famigis plivaste la filmo *Nigra Orfeo*.

Johano Gilberto estis en 1958 preskaŭ nekonata kiel kantisto, sed tiam li registris kelkajn kantojn de Tom Jobim, inter ili *Desafinado* (malagordigita) kaj *Chega da saudade*, kiujn oni rigardas kiel la unuan aperigon de la nova ondo en muziko brazila, tio estas, *bossa nova*. Tio estis grava muzika movado, kiu daŭrigas ĝis hodiaŭ, kaj kiujn oni priskribis tiam kiel *logantan miksaĵon da usona jazmuziko malvarma kaj eŭropa klasika harmonio*, kiu vere estas *amasa kulturo regata de facila aŭskultado de rok-and-rol*. La ritmo de tiu nova muziko estis dolĉa takto da ok notoj regulaj kun malregulaj akcentoj, kiu devenis de *sambo*, kiu siavice venis de afrika muziko de sovaĝaj modeloj ritmaj, kiun oni ludis per perkutaj iloj. Fakte, bossa nova nudigas sambon de bruo kaj malsimplaĵoj, aperigante ĝentilan zumadon pli mallaŭtan, sed kiu ankoraŭ enhavas hipnotajn akcentojn. Aldone, estas frotado de gitaro kun glitantaj melodioj kaj vortoj. La rezulto estas tre alloga ritma muziko, kiu rekte venas al koro de aŭskultanto. Tiun senton brazilanoj rapide baptis kiel *saudade*-n, senton, kiu estas malgaja kaj gaja samtempe, kaj kiun mi aŭdis esperantistoj brazilajn neologismi en Esperanton kiel *saudado*.

Oni kredas vidi en tiu muziko, ankaŭ, influojn de jazistoj usonaj kiel Gerry Mulligan, Chet Baker kaj Barney Kessel, kiuj, certe, influis la muzikon de Tom Jobim. Sed tre grave en lia muziko estis ankaŭ francaj komponistoj, kiel Debussy kaj Chopin, kaj ankaŭ lia samlandano, Heitor Villa-Lobos. Sed en la mezo de la kvindekaj jaroj, gitaristo Laurindo Almejda aldonis

ritmojn bosanoveskajn en siajn registraĵojn diskajn, kaj Johano Gilberto ankaŭ komencis ludi sian gitaron per tiuj sinkopivaj ritmoj, kiuj iĝis bazon de *bossa nova*. Pro tio, Jobim atribuis la kreadon de tiu nova muzika formo al Johano Gilberto. Tamen, Jobim mem vestis la novan ritmon per sia supera harmoniada kaj melodioj, per sia kantaro nova. *Chega de Saudade*, evidente, lanĉis la movadon *bossa*

nova en Brazilo, kaj la partituro de *Nigra Orfeo* (Black Orpheus, en la originala titolo) lanĉis la ritmon en la tutan mondon en 1959. Tri jaroj poste Stan Getz registris *Desafinado*-n, kio konatigis lin kaj Jobimon mem en Usono. La vortojn *bossa* kaj *nova* oni aldonis al muzika terminaro usona, kaj multaj

famaj kantistoj tie aldonis la *novan ondon* al siaj kantoj. Multaj brazilaj muzikistoj flugis al Novjorko por la unua koncerto *bosanova* en halo Carneĝi Hol je la 22-a de Novembro de 1962, ekzakte antaŭ 40 jaroj¹. Ankaŭ Tom Jobim estis tie, en sia unua vizito al Usono.

Du jarojn poste, kiam oni dirus, ke *Bossa Nova* komencis stagni, Johano Gilberto kaj Tom Jobim aperigis *A garota de Ipanema* (knabino de Ipanema), kiu reviviĝos ĝin. Tri jarojn poste, Jobim estis pli vaste konigita, kiam li kunlaboris kun Frank Sinatra, en kabaredeska programo televida, kiun li gvidis en tiu tempo en Usono. Frank kaj Tom kantis duope je la *Knabino de Ipanema* (fama plaĝo de Rio), kaj

en la portugala kaj en la angla sinsekve. Ili kunlaborado komencis je 1966 kaj daŭris ĝis la sepdekaj jaroj. En tiu tempo la bosanova ne estis jam nova, kaj perdis grundon, sed nun ankoraŭ estas en la muziko de Brazilo, iel ajn.

Jobim preferis registri al koncertumi, do li produktis multajn diskojn per firmaoj Verve, Warner Bros, Discovery, A&M, CTI kaj MCA de la sesdekaj al sepdekaj jaroj, kaj por Verve en la okdekaj ĝis la naŭdekaj.

Lia gitara kaj piana ludadoj havis simplan stilon, modestan kaj ofte ĉarman. Li plej ofte laboris por kinaj kaj televidaj sonbendoj brazilaj. Sed finfine en la naŭdekaj jaroj, denove li iĝis popola, kiam li denove koncertumis kun sia dua edzino, Ana Lontra, sia filo Paulo kaj sia filino Elizabeto, kune kun aliaj muzikistoj amikaj, kiuj formis la Novan Bandon. Ili trairis Brazilon

koncertumante en 1993, kaj je la 8-a de decembro de 1994 ili ludis kaj kantis en la konata Halo Carneĝi de Novjorko. Baldaŭ poste li mortis pro koratako. Lia influo en la muziko de Brazilo estas tre granda, kaj li estas unu el la naciaj herooj tie.

Ni esperantistoj havas la avantaĝon ĝui liajn kantojn en nia lingvo internacia, ĉar Aleksandro Cossavella kaj Flávio Fonseca registris mirindan diskon, *Brazilo Kolekto, Tom Jobim en Esperanto*, kun la vortoj de la naŭ plej belaj kantoj de Jobim en Esperanto, por ke oni povu kanti kune kun Jobim kaj la kantistoj esperantaj, praktikante nian lingvon dum ke oni kaptas la spiriton de Brazilo, ĉar kune kun la disko, oni inkluzivis libreton kun la vortoj por ĉiu kanto en Esperanto.



¹Ĉi tiun artikolon mi verkis la 22-an de novembro 2002.

La Hispana Vortaro

Kiel eble vi ĉiuj scias, estas intenco eldoni la *Grandan Vortaron Hispana-Esperanto*, de Fernando de Diego. Tiu verko estas unu el la plej gravaj produktitaj en nia movado de antaŭ multe da jaroj, kaj ĝi ampleksos pli ol PIV, kaj enhavas kvin dek mil enirvortojn, kun klarigoj, frazoj, ekzemploj, ktp.

La kosto de la eldono ne permesis eldoni ĝin ankoraŭ. Pro tio, mi lanĉas kampanjon por klopodi atingi la necesan monon por eldoni ĝin plej baldaŭ kiel eble. La budĝeto estas 13 000 eŭroj.

Pro tio, mi petas al ĉiu unuopa samideano, asocioj, sponsoroj, privataj kaj publikaj institucioj, aliĝi al ĉi tiu kampanjo por tuj eldoni tiun mirindaĵon.

Se oferto venas, oni malfermos konton speciale tiucele, ĉe Hispana Esperanto-Federacio aŭ ĉe Valensja Esperanto-Federacio.

La aperigo de la vortaro estos en si mem omaĝo al nia elstara Fernando de Diego.

Koran dankon anticipe.

Aŭgusto Casquero de la Cruz,

Estrarano de Hispana
Esperanto Federacio
komisiita por ĉi tiu eldono.

Kiam mi ankoraŭ pretigas tiun ĉi numeron, venas al mi bonega novaĵo de Miĥaelo Gutiérrez Adúriz, el Kantabrio, dirante, ke oni jam povas antaŭmendi la *Grandan vortaron Hispana-Esperanton*. La kosto estas 33 eŭroj, se oni kolektas ĝin je ĝia prezentado, la 15-an

de julio de 2003, dum la Kongreso de HEF en Valensjo. Se oni deziras, ke oni sendu rekte al lia hejmo, oni aldonu sendokostojn.

Laŭ Gutiérrez Adúriz, la vortaro estos tiom korpa kiel la nova versio de la *Ple-na Ilustrita Vortaro*, sed dulingva, kompreneble. Oni jam komencas nomi tiun ĉi vortaron kiel *la hispanan PIVon*. :-) Eble tiun verkon ni jam bezonis, ĉar tiu, kiun ni uzas kutime, kun tiom da profito kaj utileco (*Sopena*), ververe, havas evidentajn mankojn. Vortaroj ofertas, ni scias, eblecojn paroli klare kaj elegante, vortumi nian penson plej ekzakte, kiel ni povas. Nia memoro ja estas malforta, kaj ni kutime proponas kunmetaĵon provizoran, kiam mankas vortoj al ni. Vortaro helpas nin tiam, ĉar vortaristo jam pensis pri tiuj situacioj, kaj ofertas solvojn, kiujn li rekomendas. Ili ne estu devigaj, kompreneble, sed konsilo ĉiam povas helpi en tikla situacio, ĉu ne?

Fernando de Diego estas sufiĉe konata esperantisto. Li verkis tradukon de la fama novelo *Don Kihoto de la Manĉa*, de Miĥaelo Servanteso, kaj multaj aliaj, dum sia longa vivo kiel aktiva esperantisto. Same kiel inter hispanoparolantoj, la indikoj de la fama Vortaro de la Reĝa Akademio Hispana ne ĉiam plaĉas al ni, kaj ni preferas sekvi la konsilojn de la vortaro de *Maria Moliner* (tiel nomita la verko), kies prestiĝo estas simila al tiaj, tiu ĉi nova vortaro de Diego povus esti nia *mariamolinereska* vortaro de Esperanto. Laste, mi diros, ke ĝi estos plej grava donaco al hispanamerika esperantisto.

Fondo de grupo SAT-en-Hispanio

Dum la lasta kongreso de Sennacieca Asocio

landoj. Ĝi ankaŭ estos malferma al la partopreno

TutvenstatlandononEspvarTiuLElaŭHApo s a dec nov tan cel dig lo ĝ His me sin sim non po SA L me me pro org E ki ŭ esta ank SA A sen His taŭ Ĝi ank

Legantoj de *Boletín* ja scias pri la iniciato de kelkaj anoj de SAT, kiuj dum la lasta Monda Kongreso de ties asocio, en Alikanto, proponis krei novan LEAon, tio estas, nacioloĝantan asocion rilatantan al SAT, pro tio, ke ili ne estas feliĉaj kun la agado kaj trajtaro de HALE, kiu estas, ĝis hodiaŭ, la sola hispana LEA.

Mi abunde leterumis kun kelkaj samideanoj tiaj per Interreto, kaj eĉ ofertis mian kunlaboradon. Mi intencis prezenti ĉi tie la artikolon, kiun pri tiu temo Toño del Barrio publikigis en *Boletín*, la bulteno de la Hispana Esperanto Federacio, kies rilato al UEA estas same kiel tiu de HALE al SAT —almenaŭ oficiale—. Sed ŝajnas, ke la redaktinto de la artikolo ne estas tre feliĉa pro tio, ke lia objektiva klarigo pri iliaj motivoj kaj planoj, aperu

ĉi tie, en la magazino de la hispana asocio rilatanta al SAT.

Pro tio, ke mia sinteno ĉiam estis diskutanta, sed ne disputanta, mi honoras tiun peton, kaj mi renoncas al mia kutimo, prezenti al leganto de *Kajeroj el la Sudo* la citatan



SATanoj kleriĝas en Alikanto.

ro. Scivolaj legantoj turnu sin al numero 358-a de *Boletín*, paĝo 14-a. Tiel oni komprenos plene la ideojn, kiujn mi verŝas en la apuda paĝo.

Ne pensu, ke ekzistas konkurenco en mia animo. Nur emon trovi kaj diri veron. Aliflanke, mi deziras al SATenHanoj plenplenon da sukceso kaj bonlaborado. Nur kuraĝon kaj sukceson mi honeste povas deziri al ili. Se ili pravas, mia tasko estonta multe pli faciliĝos. Antaŭdankon.


Jesuo

Toño del Barrio.

SATeH kaj HALE

En HALE oni salutas kuraĝige tiun ĉi iniciaton de Toño del Barrio kaj aliaj hispanoj de SAT, kiuj ne estas feliĉaj pri la etoso sennacieca, porlaborista aŭ peresperanta de HALE. Ni ne sentas nin kiel konkurencon, sed kiel komplementon. Ni fiere povas diri, ke ni tenis la torĉon dum tiuj pasintaj jaroj, por ke pli valoraj homoj venu kaj plibonigu nian agadon. Mi mem pretas kunlabori plej bone kaj efike, kiel eble. Tiucele, mi jam petis aliĝilon al nova LEAO.

Tamen, mi ne akceptas, ke HALE ne plenumis la rolon, kiun la Konvencio de Gotemburgo asignis al ĝi, kaj se oni ne faris plu, tio ŝuldiĝas al tio, ke ni ne povis. Kiam mi venis en la redakcion de ĉi tiu magazino, mi trovis maljustan kaj eraran aferon en tio, ke la redaktoro kaj la Prezidanto ne kongrue agis, kaj sekve, artikoloj de la Prezidanto ne estis publikigitaj. Mi skandalite asertis al tiama Prezidanto Marteno Bustin' Benito, ke rolo de Prezidanto de asocio ia ajn estas ion diri al baza ano, vera subtenanto. La magazino, kiu ĝis tiam estis atkvalita kaj varia pro senĉesa aperigado de poezio kaj historio, komencis havi ankaŭ pli ĉiutagan problemaron diskutatan en siaj paĝoj. Vere estas, ke la nivelo lingva kaj socia de la antaŭa redaktoro estas malfacile plenumbla, sed mi honeste povas diri, ke mi faris ĉion, kion mi povis por konservi ĝin en digna proksimeco al tio. Ne estas la unuan fojon, kiam mi diris kaj diras, ke oni anstataŭu min, se oni trovu pli taŭgan homon fari ĉi tiun taskon. Fakte, ankaŭ al mi plaĉus dediĉi miajn fortojn al aliaj, pli profitodonaj taskoj.



Kio okazas en Hispanio?, ŝajnas diri pola Beata, partopreninto en Kongreso de Alikanto.

Aliflanke, de la monato de aprilo, sekvante iniciaton de la tiama kasisto, Kamarado Jozefo Maria Bernabeŭ Franko, la tuta estraro demisiis, kaj por ke la afero povu funkcii dume, sole la prezidanto kaj la redaktoro daŭre funkcias en siaj postenoj provizore. Ni petis al HALEanoj tiam, ke oni prezentu sian kandidatiĝon al estraro, kaj la venintan monanton de oktobro, oni komencus balotan procezon. Bedaŭrinde, kandidatiĝoj ne venis, kaj ni eksteroficiale plilongigis la periodon por prezentado unu monaton pli. Nun ni invitas ĉiujn niajn anojn voĉdoni pri la sola kandidatiĝo, kiu estas, pri kiu mi parolas en la tria paĝo de ĉi tiu numero.

Sed mi vidas, ke la problemo estas, ke tre valoraj anoj de SAT organizis sin pro tio, ke ili sentas, ke la celoj de HALE kaj de SAT diverŝiĝas. Pro tio, ke nur unu subskribinto de tiu manifesto (kovrilpaĝo de numero 55-a) estas ano de HALE, la kandidatoj al estraro de HALE decidis en nia lasta semajna kunveno, ke ni remalfermos la balotadon la venontan monaton de novembro 2003. Tio ebligas al emantaj hispanoj, ke ili aliĝu al HALE, kaj post unu jaro, laŭ nia Statuto (n-ro 33-a, <http://storm.prohosting.com/jesuo/k33stat.htm>, kaj 34-a, <http://storm.prohosting.com/jesuo/k34gasm.htm>) ili povu kandidatiĝi al estraro por plej bone agi kaj fari por la celoj de SAT en Hispanio. Egoisme pensante, mi povas diri, ke mi voĉodonas por ili, por tiel lasi mian taskon al ili.

Tamen, mi povas diri, ne ĝenas min io ajn, kiun mi faris kiel redaktoro, laboristo aŭ esperantisto, koncerne al SAT aŭ al ĝiaj celoj. Tion, kion mi trovis maltaŭga pri SAT kaj ĝiaj anoj, kio estis sufiĉe grava, mi preparolis en ĉi tiu magazino, kaj mi daŭre faros ĉu ĉi tie, kiel redaktoro ĉu —se mi estas bonaŝanca— kiel simpla ano, ĉu alimagazine, ĉu kiel simpla, privata esperantisto.

La Faraono

ĈAPITRO VI

Oni eniradis en la palacon de l' faraono en Memfiso tra pordego inter du kvinetaĝaj turoj aŭ pilonoj. La eksteraj muroj de ĉi tiuj konstruaĵoj el griza sabloŝtono de la malsupro ĝis la tegmento estis kovritaj per skulptaĵoj.

Sur la supro de la pordego oni vidis la insignon aŭ la simbolon de l' ŝtato: globon kun flugiloj, de post kiu elrigardis du serpentoj. Pli malalte sidis vico da dioj, al kiuj la faraonoj faris oferojn. Sur la flankaj kolonoj ankaŭ estis skulptitaj dioj laŭ kvin vicoj, unu super alia, kaj sub ili hieroglifaj surskriboj.

Sur la muroj de ĉiu pilono la ĉefan lokon okupis skulptaĵo de Ramzes Granda, kiu en unu mano havis levitan hakilon kaj per la alia tenis je la haroj aron da homoj, ligitajn en faskon kvazaŭ petroselo. Super la reĝo ankaŭ sidis du vicoj da dioj, unu super la alia; ankoraŭ pli alte vico da homoj portantaj oferojn, kaj sub la pinto de l' pilonoj - bildoj de flugilaj serpentoj, intermiksitaj kun bildoj de skaraboj.

Ĉi tiuj kvinetaĝaj pilonoj, kun muroj mallarĝiĝantaj supren, ĉi tiu trietaĝa pordego, kiu kunigis ilin, la skulptaĵoj, kies malgaja fantazio miksis kruelecon kun pieco, faris premegan impreson. Ŝajnis, ke estas malfacile eniri tien, ne eble eliri, kaj malfeliĉo - vivi.

Tra la pordo, antaŭ kiu staris la armeo kaj amaso da simplaj oficistoj, oni eniradis en la korton, ĉirkaŭitan de portikoj, apogitaj sur unuetaĝaj kolonoj. Tio estis hela malgranda ĝardeno, en kiu oni kulturis malgrandajn aloojn, palmojn, oranĝarbojn kaj cedrojn en vazoj, ĉiuj estis ordigitaj en vicoj laŭ la kresko. En la mezo ŝprucis

fontano; la vojetoj estis surŝutitaj per kolora sablo.

Ĉi tie sub la portikoj sidis aŭ promenis altrangaj oficistoj de l' ŝtato, mallaŭte murmuretante.

El la korto, tra alta pordo, oni eniradis en salonon, apogitan sur dek du trietaĝaj kolonoj. La ĉambrego estis granda, sed ŝajnis malvasta pro la dikeco de la kolonoj. Lumigis ĝin malgrandaj fenestroj en la muroj kaj granda ortangula truo en la plafono. Malvarmo de l' ombro regis tie, kaj preskaŭ krepusko, kiu tamen ne malhelpis vidi la flavajn murojn kaj kolonojn kovritajn per pentraĵoj en vicoj, unu super la alia. Supre folioj kaj floroj, pli malsupre dioj, sube homoj, portantaj iliajn statuojn aŭ fantajz oferojn, kaj inter ĉi tiuj grupoj linioj de hieroglifoj. Ĉio ĉi estis pentrita per klaraj, preskaŭ tranĉantaj koloroj: verda, ruĝa kaj blua.

En ĉi tiu salono, sur la mozaika planko staris silente, en blankaj vestoj kaj nudpiede, la pastroj, la plej altaj oficistoj de l' ŝtato, la milita ministro Herhor kaj la militistestroj: Nitager kaj Patroklo, alvokitaj de la faraono.

Lia sankteco Ramzes XII, kiel ĉiam antaŭ la konsilo, faris oferojn al la dioj en sia kapelo. Tio daŭris sufiĉe longe. Ĉiumomente el la pli malproksimaj salonoj alkuris iu pastro aŭ oficisto, komunikante detalojn pri la diservo.

- La sinjoro jam rompis la sigelon de la kapelo...
Li jam lavas la dion... Li jam vestas lin... Li jam fermis la pordon.

La vizaĝoj de la ĉeestantoj, malgraŭ ilia alta rango, ŝajnis maltrankvilaj kaj malgajaj. Nur Herhor estis indiferenta, Patroklo senpacienca, kaj Nitager de tempo al tempo rompis la solenan



silenton per sia potenca voĉo. Post ĉiu nekonvena diro de la maljuna generalo, la korteganoj moviĝis, kiel timigitaj ŝafinoj, kaj poste rigardis unu alian, kvazaŭ dirante:

» Tio estas maldelikatulo, la tutan vivon li persekutas barbarojn, oni do povas pardoni al li... «

En la pli malproksimaj ĉambroj eksonis sonoriloj kaj ektintis armiloj. En la salonon eniris en du vicoj deko da gvardiistoj en oritaj kaskoj kaj kirasoj, kun nudaj glavoj, poste du vicoj de pastroj, kaj fine la faraono, portata sur trono, ĉirkaŭita de nuboj de bonodorfumo.

La estro de Egipto, Ramzes XII estis homo preskaŭ sesdekjara, kun velkinta vizaĝo. Li havis blankan togon, sur la kapo ruĝe-blankan kufon kun ora serpento, en la mano longan bastonon.

Kiam la faraono aperis, ĉiuj falis sur la vizaĝon. Nur Patroklo, kiel barbaro, kontentiĝis per profunda saluto, kaj Nitager ekgenuis sur unu genuo, sed tuj leviĝis.

La portilo haltis antaŭ baldakeno, sub kiu staris alte ebona trono. La faraono malrapide eliris el la portilo, momenton rigardis la ĉeestantojn, kaj poste sidiĝinte sur la trono fiksis la okulojn sur la kornico de l' salono, kie estis pentrita roza globo kun bluaj flugiloj kaj verdaj serpentoj.

Dekstre de l' faraono stariĝis la ĉefa skribisto, maldekstre la juĝisto kun bastono, ambaŭ en grandegaj perukoj. Post signo, farita de l' juĝisto, ĉiuj sidiĝis aŭ ekgenuis sur la planko, kaj la skribisto sin turnis al la faraono:

- Nia sinjoro kaj potenca estro! Via servisto Nitager, la granda gardisto de la orienta limo, venis por honoro vin kaj alportis la tributon de la venkitaj popoloj: vazon el verda ŝtono plenan de oro, tricent bovojn, cent ĉevalojn kaj bonodoran lignon Teŝep.

- Tio estas mizera tributo, mia sinjoro - diris Nitager. - Veraj trezorojn ni trovis nur sur la bordoj de Eŭfrato,

kie al la malhumilaj, kvankam ankoraŭ malfortaj reĝoj oni devas rememorigi la tempojn de Ramzes Granda.

- Respondu al mia servisto Nitager - diris la faraono al la skribisto - ke liaj vortoj estos atente konsideritaj. Kaj nun demandu lin, kia estas lia opinio pri la militaj kapabloj de mia filo kaj heredonto, kontraŭ kiu li havis la honoron batali apud Pi-Bailos?

- Nia estro, sinjoro de naŭ popoloj, demandas vin, Nitager... - komencis la skribisto.

Subite - imagu la skandalon - la generalo interrompis maldelikate:

- Mi mem aŭdas, kion diras mia sinjoro... Kiam li sin turnas al mi, nur la kronprinco, ne vi, granda skribisto, povus esti lia buŝo.

La skribisto terurite ekrigardis la trobravan, sed la faraono diris:

- Mia fidela servisto, Nitager, estas prava.

La ministro de la milito kliniĝis.

Nun la juĝisto anoncis al ĉiuj ĉeestantoj: al la pastroj, oficistoj kaj gvardiistoj, ke ili povas

eliri en la korton, kaj li mem kun la skribisto, kliniĝinte antaŭ la trono, unuaj forlasis la salonon. Restis nur la faraono, Herhor kaj la du generaloj.

- Klinu viajn orelojn, estro, kaj aŭskultu miajn plendojn - komencis Nitager. - Hodiaŭ matene, la pastro oficisto, kiu laŭ via ordono venis olei miajn harojn, diris al mi, ke irante al vi mi demetu la sandalojn en la vestiblo. Sed estas ja afero konata ne nur en Supra kaj Malsupra Egipto, sed eĉ ĉe Hetoj, Libianoj, Fenicianoj kaj en la lando Punt, ke antaŭ dudek jaroj vi permesis al mi aperadi antaŭ vi en sandaloj.

- Vi diras la veron - diris la faraono. - Diversaj malordoj englitis en mian kortegon.

- Ordonu nur, reĝo, kaj miaj veteranoj tuj faros ordon... - rapidis diri Nitager.

La milita ministro faris signon. Enkuris kelke da servistoj: unu alportis la sandalojn kaj piedvestis Nitageron, aliaj stariĝis antaŭ la trono multekostajn taburetojn por la ministro kaj generaloj.

Kiam la tri altrunguloj sidiĝis, la faraono demandis:



- Diru al mi, Nitager, ĉu vi kredas, ke mia filo estos bona militestro?... Sed parolu sincere?

- Per Amon de Teboj, per la gloro de miaj antaŭuloj, en kiuj fluis reĝa sango, mi ĵuras, ke Ramzes, via heredonto, estos granda militestro, se la dioj permesos al li - respondis Nitager. - Li estas ankoraŭ juna knabo, preskaŭ infano, tamen kun granda lerteco li kolektis la regimentojn, armis per ĉio kaj faciligis ilian marŝon. Sed plej multe plaĉis al mi, ke li ne perdis la kapon, kiam mi baris al li la vojon, sed ekkondukis la siajn al la atako. Li estos granda militestro kaj venkos Asirianojn, kiujn oni devas venki hodiaŭ, se ni ne volas, ke niaj nepoj vidu ilin sur la bordoj de Nilo.

- Kion vi diras pri tio Herhor? - demandis la faraono.

- Koncerne Asirianojn, mi pensas, ke Nitager tro frue ĉagreniĝas pro ili. Ni estas ankoraŭ malsanaj post la lastaj militoj kaj ni devas plifortiĝi, antaŭ kiam ni komencos novan bataladon - diris la ministro.

- Koncerne la kronprincon, Nitager prave diras, ke la junulo posedas la ecojn de l' estro: li estas ruza kiel vulpo kaj atakema kiel leono. Tamen li faris hieraŭ multe da eraroj...

- Kiu el ni ne faris ilin?... - intermetis Patroklo, ĝis nun silentanta.

- La kronprinco - daŭrigis la ministro - saĝe kondukis la ĉefan korpuson, sed li malzorgis sian stabon, jen kial ni marŝis tiel malrapide kaj senorde, ke Nitager povis bari al ni la vojon...

- Eble Ramzes kalkulis je via ekscelenco? - demandis Nitager.

- En la administrado kaj milito oni devas kalkuli je neniu: unu sola nerimarkita ŝtoneto povas faligi nin - diris la ministro.

- Se via ekscelenco ne estus depuŝinta, nian kolonon de la ŝoseo pro iaj skaraboj...

- Vi estas, ekscelenco, fremdulo kaj idolisto - respondis Herhor - kaj tial vi tiel parolas. Ni Egiptanoj komprenas, ke kiam la popolo kaj soldatoj ĉesos respekti la skarabojn, iliaj filoj ĉesos timi la ureuson. La malŝato al la dioj naskos ribelon kontraŭ la faraono.

- Kaj por kio servas la hakiloj? - interrompis Nitager. - Kiu volas konservi la kapon sur la nuko, tiu obeu la ĉefestron.

- Kia do estas via definitiva opinio pri la kronprinco? - demandis la faraono Herhoron.

- Vivanta bildo de la suno, filo de l' dioj - respondis la ministro. - Ordonu sanktotei Ramzeson, donu al li grandan ĉenon kaj dek talentojn, sed ne nomu lin komandanto de la korpuso de Memfiso. La kronprinco estas tro juna, tro flamema, tro nesperta por ĉi tiu tasko. Ĉu ni povas proklami lin egala al Patroklo, kiu en dudek bataloj piedpremis Etiopianojn kaj Libianojn. Ĉu ni povas loki lin apud Nitager, kies sola nomo de dudek jaroj paligas niajn malamikojn de l' oriento kaj nordo?

La faraono apogis la kapon sur la mano, konsideris momenton kaj diris:

- Foriru en paco kaj favorataj de mi. Mi agos, kiel ordonas la saĝo kaj justeco...

La altranguloj malalte kliniĝis, kaj Ramzes ne atendante la sekvantaron pasis en siajn ĉambrojn.

Kiam la du generaloj restis solaj en la vestiblo, Nitager sin turnis al Patroklo:

- Ĉi tie, mi vidas, la pastroj estras kvazaŭ ĉe si. Sed kia komandanto estas Herhor!... Li venkis nin, antaŭ kiam ni komencis paroli kaj... li ne donos la korpuson al la kronprinco!...

- Li tiel laŭdis min, ke mi ne kuraĝis ekparoli - respondis Patroklo.

- Cetere, li vidas malproksime, kvankam li ne diras ĉion. Post la kronprinco englitis en la korpuson diversaj sinjoridoj, kiuj kun kantistinoj veturas militon, kaj ili okupas plej altajn postenojn. Kompreneble la maljunaj oficiroj komencus fari nenion kolerante, ke ili ne ricevas avancon; la elegantuloj farus nenion pro la amuzoj, kaj



la korpuso fendigis, jam sen atako kontraŭ malamiko.
O, Herhor estas saĝulo!...

- Ne kostu al vi lia saĝo pli multe, ol la nesperto de
Ramzes! - murmuretis la Greko.

Tra serio da ĉambroj, plenaj de kolonoj kaj ornamitaj
per pentraĵoj, kie ĉe ĉiu pordo la pastroj kaj palacaj
oficistoj profunde salutis lin, la faraono pasis al sia
kabineto. Tio estis duetaĝa salono; sur ĝiaj alabastraj
muroj per oro kaj helaj koloroj estis pentritaj la plej gravaj
faktoj de la regado de Ramzes XII: respekto de la
loĝantoj de Mezopotamio, la veno de senditoj de la reĝo
de Buĥten kaj la triumfa vojaĝo de l' dio Honsu tra la
lando Buĥten.

En la salono estis ornamita per oro kaj per juveloj
malakita statuo de Horus kun birda kapo, antaŭ ĝi altaro
en formo de detranĉita piramido, reĝaj armiloj,
multekostaj apogseĝoj kaj benkoj, fine tabletoj ŝarĝitaj
per bagatelajoj.

Kiam la faraono aperis, unu el la ĉeestantaj pastroj
bruligis incenson antaŭ li, kaj unu el la oficistoj anoncis
la kronprincon, kiu preskaŭ en la sama momento eniris
kaj salutis la patron. Sur la esprimplena vizaĝo de l'
kronprinco estis videbla febra maltrankvilo.

- Mi ĝojas, erpartre - diris la faraono - ke vi revenas
sana el la laciga vojaĝo.

- Vivu via sankteco eterne kaj plenigu per siaj faroj la
du mondojn!

- respondis la princo.

- Miaj militaj konsilistoj - daŭrigis la faraono - ĵus rakontis
al mi pri via laboro kaj prudento.

La vizaĝo de l' kronprinco tremis kaj aliĝis. Li fiksas
siajn grandajn okulojn sur la okuloj de l' faraono kaj
aŭskultis.

- Viaj agoj ne restos sen rekompenco. Vi ricevos dek
talentojn, grandan ĉenon kaj... du grekajn regimentojn,
kiujn vi ekzercos.

La princo ŝtoniĝis de surprizo, sed post momento
demandis per sufokita voĉo:

- Kaj la korpuso de Memfiso?...

- Post unu jaro ni ripetos la manovrojn, kaj se vi faros
neniun eraron en la komandado, vi ricevos la korpuson.

- Mi scias, tion faris Herhor!... - ekkriis la kronprinco,
apenaŭ haltigante sian koleron.

Li ĉirkaŭrigardis kaj aldonis:

- Mi povas neniam esti sola kun vi, mia patro... Ĉiam
inter ni estas fremdaj homoj.

La faraono delikate ekmovis la brovojn, kaj lia
sekvantaro malaperis, kiel aro da ombroj.

- Kion vi volas diri al mi?

- Nur jenon, patro: Herhor estas mia malamiko... Li
kulpigis min antaŭ vi kaj kaŭzis al mi tian honton!...

Malgraŭ sia humila teniĝo, la princo mordis la lipojn kaj
kunpremis la pugnojn.

- Herhor estas mia fidela servisto, kaj via amiko. Dank'
al lia elokventeco vi estas la kronprinco. Tio estas mi,
kiu ne konfidas la korpuson al juna homo, kiu lasis sin
detranĉi de sia armeo.

- Mi kuniĝis kun ĝi!... - respondis la frakasita princo. -
Tio estis Herhor, kiu ordonis ĉirkaŭiri du skarabojn...

- Vi do volas, ke pastro antaŭ la armeo malŝatu la reli-
gion?

- Mia patro - murmuretis Ramzes per tremanta voĉo -
por ne malhelpi la marŝon de skaraboj, oni detruis
kanalon kaj mortigis homon.

- Ĉi tiu homo mem mortigis sin.

- Sed pro la kulpo de Herhor.

- En la regimentoj, kiujn vi tiel lerte kolektis apud Pi-
Bailos, tridek homoj mortis de laciĝo, kaj kelkcentoj
estas malsanaj.

La princo mallevis la kapon.

- Ramzes - daŭrigis la faraono - per via buŝo parolas
ne altranga estro ŝtata, kiu zorgas pri la ekzisto de la
kanaloj kaj pri la vivo de la laboristoj, sed kolera homo.
La kolero ne estas amiko de la justeco, kiel la vulturo
ne estas amiko de la kolombo.

- Ho mia patro - eksplodis la kronprinco - la kolero
ekscitas min ĉar mi vidas la malbonan volon de l' pastroj
kaj de Herhor kontraŭ mi...

- Tamen vi mem estas nepo de ĉefepiskopo, la pastroj
instruis vin... Vi ekkonis iliajn sekretojn pli bone, ol iu
ajn alia princo...

- Mi ekkonis ilian nesatigeblan fieron kaj deziron regni.
Sed ĉar mi ĉesigos tion, jam hodiaŭ ili estas miaj
malamikoj... Herhor ne volas doni al mi unu korpuson,
ĉar li preferas komandi la tutan armeon...

Ĵetinte ĉi tiujn senkonsiderajn vortojn, la kronprinco haltis terurita Sed la faraono levis al li sian kvietan rigardon kaj respondis trankvile:

- La armeo kaj ŝtato estas regataj de mi. De mi devenas ĉiuj ordonoj kaj verdiktoj. En tiu ĉi mondo mi estas la pesilo de Oziriso, kaj mi sola pesas la aferojn de miaj servistoj: de la kronprinco, ministro aŭ popolo. Neprudenta estus tiu, kiu pensus, ke mi ne konas ĉiujn pezojn.

- Tamen, mia patro, se vi estus rigardinta la manovrojn per propraj okuloj...

- Eble mi estus vidinta generalon - interrompis la faraono - kiu en decida horo persekutas inter arbetoj hebrean knabinon. Sed mi volas scii nenion pri tiaj vantaĵoj.

La princo falis al la piedoj de l' patro, murmuretante:

- Tutmozis diris al vi pri tio, ho sinjoro?...

- Tutmozis estas infano, kiel vi. Li jam faras ŝuldojn, kiel estro de l' stabo de la memfisa korpuso, kaj li pensas, ke la okulo de l' faraono ne atingos liajn agojn en la dezerto.

ĈAPITRO VII

Post kelke da tagoj Ramzes estis alvokita al sia plej respektinda patrino Nikotris, kiu estis la dua edzino de l' faraono, sed nun la plej granda sinjorino en Egipto.

La dioj ne eraris, farante ŝin patrino de reĝo. Ŝi estis persono alta, sufiĉe dika kaj malgraŭ siaj kvardek jaroj, ankoraŭ bela. Precipe en la okuloj, vizaĝo kaj tuta aspekto ŝi havis tian majeston, ke eĉ kiam ŝi iris en simpla vesto de pastrino, ĉiuj klinis antaŭ ŝi la kapon.

La nobla sinjorino akceptis la filon en kabineto, ornamita per fajencaj kaheloj. Ŝi sidis sur inkrustita seĝo, sub palmo. Ĉe ŝiaj piedoj sur tabureto kuŝis malgranda hundo; ĉe la alia flanko genuis sklavino kun ventumilo. La reĝa edzino havis sur si

muslinan mantelon, broditan per oro, kaj sur la peruko lotusforman ringon ornamitan per juveloj.

La princo profunde kliniĝis, la hundo ĉirkaŭflaris lin kaj ree kuŝiĝis. La reĝino delikate klinis la kapon kaj demandis:

- Kial vi petis aŭdiencon de mi?

- Jam antaŭ du tagoj, patrino...

- Mi scias, ke vi estis okupata. Sed hodiaŭ ni ambaŭ havas liberan tempon, kaj mi povas aŭskulti vin.

- Vi tiel parolas al mi, ke kvazaŭ vento de l' dezerto blovas sur min, kaj mi ne havas plu kuraĝon prezenti al vi mian peton.

- Kredeble pri mono?

Ramzes konfuzita mallevis la kapon.

- Kiom vi bezonas?

- Dek kvin talentojn...

- Ho dioj! - ekriis la reĝino - antaŭ kelke da tagoj oni ja pagis al vi dek talentojn el la trezorejo. Promenu iom, mia knabino, en la ĝardeno - sin turnis la reĝino al la nigra sklavino, kaj kiam ili restis solaj, ŝi demandis la princon:

- Do via Hebreino estas tiel postulema? Ramzes ruĝiĝis, sed levis la kapon.

- Vi scias bone, patrino, ke ne - respondis li. - Sed mi promesis rekompenco al la armeo kaj... mi ne povas pagi!...

La reĝino rigardis lin kun trankvila fiero.

- Malbone estas - diris ŝi post momento - se la filo faras decidojn ne petante konsilon de l' patrino. Memorante pri via aĝo, mi volis doni al vi fenician sklavinton, kiun sendis al mi Tiro, kun doto de dek talentoj.

Sed vi preferis la Hebreinon.

- Ŝi ekplaĉis al mi. Tiel bela ne ekzistas inter viaj servistinoj, patrino, eĉ inter la virinoj de lia sankteco.



- Sed ŝi estas Hebreino!...

- Ne antaŭjuĝu, patrino, mi petegas vin... Estas malvero, ke la Hebreoj manĝas porkaĵojn kaj mortigas la katojn...

La reĝino ekridetis.

- Vi parolas kiel lernanto en la plej malalta pastra lernejo - respondis ŝi levante la ŝultrojn, - kaj vi forgesas pri tio, kion diris Ramzes Granda: » La flava popolo estas

pli multenombra kaj riĉa ol ni; ni agu kontraŭ ĝi, sed singarde, por ke ĝi ne fariĝu ankoraŭ pli forta... « Mi do ne pensas, ke knabino el tiu popolo estas konvena unua amatino de la kronprinco.

- Ĉu la vortoj de Ramzes povas esti aplikitaj al la filino de mizera terluanto?... - ekkriis la princo. -

Cetere, kie estas ĉi tiuj Hebreoj ĉe ni?... Antaŭ tri jarcentoj ili forlasis Egipton, kaj hodiaŭ ili formas ridindan ŝtaton, regatan de pastroj...

- Mi vidas - respondis la reĝino, - ke via amatino ne perdas tempon... Estu singarda, Ramzes!... Memoru, ke ilia estro, Messu, estas perfida pastro, kiun oni malbenas en niaj temploj ankoraŭ hodiaŭ... Memoru, ke Hebreoj forportis pli da trezoroj el Egipto, ol valoris la laboro de kelke da iliaj generacioj: ili forportis ne nur nian oron, sed ankaŭ la kredon je la Sola kaj niajn sanktajn leĝojn, kiujn ili hodiaŭ proklamas siaj. Fine sci - aldonis ŝi kun forto - ke la filinoj de ĉi tiu popolo preferas morton ol la kuŝejon de fremdulo. Kaj se ili donas sin, eĉ al estroj de l' malamikoj, ili faras tion sendube por akiri ilin por sia politiko, aŭ por mortigi ilin.

- Kredu al mi, patrino, ke ĉiujn ĉi informojn disportas la pastroj. Ili ne volas allasi al la malsupro de l' trono homojn de alia kredo, kiuj povus servi la faraonon kontraŭ ili...

La monarĥino leviĝis de l' seĝo kaj, krucinte la manojn sur la brusto, mire rigardis la filon.

- Estas do vero, kion oni diris al mi, ke vi estas malamiko de l' pastroj! - diris ŝi - Vi, ilia plej amata lernanto?...

- Verŝajne mi havas ankoraŭ signojn de iliaj bastonoj sur mia dorso!... - respondis la princo.

- Sed via avo, mia patro, Amenhotep, estis ĉefepiskopo kaj havis grandan povon en la lando...

- Guste tial, ke mia avo estis potenca, kaj ke mia patro ankaŭ estas tia, mi ne povas toleri la potencon de Herhor...

- Sur ĉi tiun postenon levis lin, via avo, la sankta Amenhotep.

- Kaj mi faligos lin.

La patrino levis la ŝultrojn.

- Kaj vi, - diris ŝi kun malĝojo, - vi volas komandi korpuson?... Vi estas trodorlotita knabino, ne viro kaj estro...

- Kiel?... - interrompis la kronprinco, apenaŭ haltigante eksplodon.

- Mi ne rekonas mian filon... Mi ne vidas en vi la estontan regnestron de Egipto!... La dinastio estos en via persono, kiel ŝipeto sen direktilo sur Nilo... Vi forpelos de la kortego la pastrojn, kaj kiu restos al vi?... Kiu estos via pupilo en la Supra kaj Malsupra lando, kiu en la eksterlando? Kaj la faraono ja devas vidi ĉion, sur kion falas la dia radio de Oziriso...

- La pastroj estos miaj servistoj, ne ministroj...

- Ili estas la plej fidelaj servistoj. Dank' al iliaj preĝoj, via patro regas tridek tri jarojn kaj evitas militojn, kiuj povus esti pereigaj...

- Por la pastroj.

- Por la faraono, por la ŝtato - interrompis ŝi. - Ĉu vi konas la staton de nia trezoro, el kiu en unu sola tago vi prenas dek talentojn, kaj postulas ankoraŭ dek kvin?... Ĉu vi scias, ke sen la oferemo de l' pastroj, kiuj por la ŝtato forprenas eĉ al dioj la verajn juvelojn kaj anstataŭas ilin per malveraj, ĉu vi scias, ke la reĝaj bienoj jam estus en la manoj de Fenicianoj?...

- Unu sukcesa milito superverŝos niajn kasojn, kiel Nilo niajn kampojn.

La monarĥino komencis ridi.



- Ne - diris ŝi - vi, Ramzes, estas ankoraŭ tia infano, ke oni ne povas riproĉi al vi viajn malpiajn vortojn. Mi petas vin, okupu vin per la grekaj regimentoj kaj kiel eble plej baldaŭ liberiĝu de la hebrea knabino, kaj la politikon lasu... al ni.

- Kial mi devas liberiĝi de Sara?

- Ĉar se vi havus de ŝi filon, komplikaj povus okazi en la lando, kiu, sen tio, jam havas sufiĉe de embarasoj. Kontraŭ la pastroj - aldonis ŝi - vi povas koleri, se nur vi ne ofendos ilin publike. Ili scias, ke oni devas multon gardoni al la kronprinco, precipe, se li havas tiel uraganan karakteron. Sed la tempo kvietiĝos ĉion por la gloro de la dinastio kaj por la utilo de la ŝtato.

La princo meditis. Subite li diris:

- Mi do ne povas kalkuli je la mono el la trezorejo?

- En neniu okazo. La granda skribisto jam hodiaŭ devus ĉesigi la pagojn, se mi ne estus doninta al li la kvardek talentojn, ricevitajn el Tiro.

- Kaj kion mi faros kun la armeo? - diris la princo, malpacience frotante la frunton.

- Forigu la Hebreinon kaj petu la pastrojn... Eble ili pruntos al vi.

- Neniam!... Mi preferas preni de Fenicianoj.

La reĝino balancis la kapon.

- Vi estas erpatre, faru kion vi volas... Sed mi avertas vin, ke vi devas doni grandan garantiaĵon; Fenicianoj, unufoje fariĝinte via kreditoro, ne ellasos vin plu. Ili estas pli ruzaj ol Hebreoj.

- Por pagi tian ŝuldon sufiĉos malgranda parto da miaj enspezoj.

- Ni vidos... Sincere, mi dezirus helpi vin, sed mi ne havas monon... - diris ŝi, kun malĝojo dismetante la manojn. - Agu do, kiel vi volas, sed memoru; ke Fenicianoj en niaj bienoj estas kiel sciuroj en la grenejoj: kiam unu englitos tra fendo, aliaj sekvos lin.

Ramzes ne rapidis foriri.

- Ĉu vi diros al mi ankoraŭ ion? - demandis la reĝino.

- Mi volus nur demandi... Mia koro divenas, ke vi, patrino, havas ian planon pri mi. Kian?

- Ne nun ankoraŭ... ne nun!... Nun vi estas libera, kiel ĉiu juna nobelulo en ĉi tiu lando, profitu do... Sed, Ramzes, venos tempo, kiam vi devos elekti edzinon, kies infanoj estos princoj de reĝa sango, kaj la filo - via posteulo. Pri tiuj tempoj mi pensas...

- Kaj?

- Nenio difinita ankoraŭ. En ĉiu okazo la politika saĝo diras al mi, ke via edzino devas esti filino de pastro...

- Eble de Herhor?... ekkriis la princo kun rido. - Kio mallaŭdinda estus en tio? Herhor baldaŭ fariĝos ĉefepiskopo en Teboj, kaj lia filino havas apenaŭ dek kvar jarojn.

- Kaj ŝi konsentus anstataŭi ĉe mi la Hebreinon?... - ironie demandis Ramzes.

- Vi devus peni, ke oni forgesu vian hodiaŭan kulpon.

- Mi kisas viajn piedojn, patrino, kaj mi foriras - diris Ramzes; premante sian kapon inter la manoj. - Mi aŭdis ĉi tie tiom da strangaj aferoj, ke mi komencas timi, ke Nilo ekfluos al la kataraktoj aŭ ke la piramidoj transiros en la orientan dezerton!

- Ne blasfemu, mia infano - murmuretis la reĝino, kun timo rigardante la filon. - En ĉi tiu lando oni vidis pli strangajn miraklojn.

- Ĉu ne tiujn - demandis la filo kun maldolĉa rideto, - ke la muroj de la reĝa palaco aŭskultis la sekretojn de siaj sinjoroj?

- Oni vidis morton de faraonoj post kelkmonata regado, kaj falojn de dinastioj, kiuj komandis naŭ popolojn!

- Ĉar ĉi tiuj faraonoj forgesis la glavon pro la bonodorfumo!... - respondis la princo.

Li kliniĝis kaj foriris.

Ju pli malproksimiĝis la paŝoj de l' kronprinco en la grandega vestiblo, des pli aliĝis la vizaĝo de la reĝino: la doloro kaj timo anstataŭis la majeston kaj larmoj ekbrilis en ŝiaj grandaj okuloj.

Ŝi alkuris al la statuo de l' diino, ekgenuis kaj preparinte indian bonodorfumon, komencis paroli:

- Ho Izido, Izido, Izido! Trifoje mi elparolas vian nomon. Ho Izido, kiu naskas la serpentojn, krokodilojn kaj strutojn, trifoje estu glorata via nomo!... Ho Izido, kiu gardas la grajnoj de l' greno kontraŭ la mortigaj ventoj, kaj la korpojn de niaj patroj kontraŭ la detruanta laboro de l' tempo, ho Izido, ekkompatu kaj gardu mian filon!... Trifoje estu elparolata via nomo kaj ĉi tie... kaj tie... kaj tie... kaj hodiaŭ, kaj ĉiam, kaj en la jarcentoj de jarcentoj, tiel longe, kiel la temploj de niaj dioj rigardos siajn bildojn en la akvo de Nilo.

Tiel preĝante kaj pleregante, la monarĥino kliniĝis kaj tuŝis la plankon per la frunto. En la sama momento eksonis super ŝi mallaŭta murmureto:

- La voĉo de l' justulo ĉiam estas aŭskultata.

La reĝino salte leviĝis kaj plena de mirego komencis ĉirkaŭrigardi. Sed en la ĉambro estis neniu. Nur de l' muroj rigardis ŝin la pentritaj floroj, kaj de l' altaro la statuo de l' diino, plena de supertera trankvilo.



Enkonduko en muzikon

Felikso Mendelssohn Bartholdy naskiĝis en Hamburgo, Germanio, la 3-an de februaro de 1809, kaj mortis en Lejpsigo la 4-an de novembro de 1847.

Lia familia etoso estis banka, artisma kaj intelekta, do li kreskis en privilegiita socia tavolo en Berlino. Lian duan nomon, Bartholdy, prenis lia familio kiam ili iĝis kristanoj kaj ĉesis esti judaj en 1816.

Li studis pianon kun Ludoviko Berger kaj teorion muzikan kaj komponarton kun Zelter, kreante sian unuan pecon en 1820. Poste, sekvis multego da sonatoj, koncertoj, simfonioj por kordoj, pianaj kvaropoj kaj kantoj, kiuj rivelis lian pligrandigantan mastecon pri kontraŭpunkto kaj formo muzika. Aldone al familiaj vojaĝoj kaj elstaraj vizitantoj ĉe liaj gepatroj (Humboldt, Hegel, Klingemann, Marx, Devrient), aliaj influoj inkluzivis la poezion de Goethe (kiun li konis en 1821) kaj la tradukojn de Ŝekspir, kiujn oni povas noti en lia plej bela muziko de tiu ĉi periodo, kiel la vasta *Okopo*, verko 20-a, kaj la viva, poezia al *Sonĝo de Nokto de mezosomero*, verko 21-a.

Lian valoron kiel direktoron oni ankaŭ rimarkis de 1829, kiam li gvidis la unuan ludadon de la *Pasio laŭ Sankta Mateo*, de Johano Sebastjano Baĥ, ludite

de la Kantakademio de Berlino, fakto tiu, kiu promociis la modernan kulturadon de la muziko de la majstro de Ajsnafi.

Li koncertumis laŭ Britio kaj Italio en 1829 kaj 1830, kaj vizitis Parizon kaj Londonon (de 1831 al 1833). Li poste gvidis en Duseldorfo ĝis 1835, ĉefe oratoriojn de Georgo Handelo. Inter la ĉefaj muzikverkoj de tiu epoko estas la *Hebriidoj*, la *Piana Koncerto en sol minora*, La *Unua Nokto de Walpurgiso*, kaj la *Itala Simfonio*, kiun vi nun aŭskultas (se vi legas min en interreto), kiun li premieris en Londono en la jaro 1833.

Lia plej granda sukceso kiel orkestra direktoro kaj muzika organizanto okazis en Lejpsigo, kie li gvidis de 1835 ĝis 1847 la Orkestron Gewandhaus, promociante kaj historiajn kaj modernajn verkojn de Baĥ, Beethoven, Veber, Ŝuman kaj Berljoz', kaj ankaŭ li fondis kaj gvidis la Konservatorion de Lejpsigo de 1843.

Li komponis ĉefe dum someraj ferioj, kaj produktis la Oberturnon de *Ruj Blas*, renovigitan version de *Himno al laŭdo*, la *Simfonion Skotan*, la nun plej faman (verko 64-a), kaj sian bonegan *Triopon por piano en do minora* (1845). Dume, lin dungis la reĝo kiel ĥormastron en Berlino, kie li verkis tre altkvalitan porokazan muzikon, ĉefe por *Sonĝo de Nokto de Mezosomero* (1843).



Liaj ebloj kiel organizanto de festivaloj iĝis, ke oni daŭre serĉu lin por tio, kaj sekve li vizitis Anglujojn dek fojojn, antaŭ lia frua morto, kiam li estis nur 38-jaraĝa, kiun oni funebris internacie.

La muziko de Mendelssohn montras influojn de idealoj klasikaj, sed ankaŭ tiujn de Baĥ (teĥnikon fuĝan), de Handel (ritmojn, harmoniajn progresiojn), de Mozarto (traĵtojn dramajn, formojn, tekson), kaj de Beethoven (teĥnikon instrumentan), kvankam de 1825 li disvolvis propran stilon sian. Vere lia romantikismo venis de lia majstra uzo de ekstermuzikaj stimuloj. Lia frua emo opera venis klare de Mozarto, sed ĝin li ne disvolvis, ĉar li interesiĝis pli pri oratorioj.

Nu, nur mi aldonu, ke ne estas sekreto, ke la muzikon de tiu germana majstro mi amas multe, ĉu ne? © Eble nun vi povas kompreni kial.





BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461**, Tfn° (00 34) 615
E30080 MURCIA, 427 143
HISPANIO

Retskribu al
jesuo@ono.com

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

<http://storm.prohosting.com/jesuo> **Esperanto@iespana.es**

La Statuto de SAT

PERANTOJ

14. Se en iu loko troviĝas pluraj membroj, ili elektas peranto(j)n, kiu(j) gvidas la administran kaj propagandan laboron por SAT en la koncerna loko. Por plenumi tiun elekton, iu aktiva membro prenas sur sin la taskon kunvoki **ĉiujn** anojn loĝantajn en urbo kaj ĉirkaŭaĵo.

ĜENERALA KONSILANTARO

15. La Ĝ.K.-aro konsistas el: a) unu membro kaj unu anstataŭanto el ĉiu geografia sektoro, elektata per referendumo samtempe kun la P.K., b) Konflikto-Komisiono. c) unu reprezentanto de la membrano el la urbo en kiu sidas la P.K., ĉ) unu reprezentanto de ĉiu L.E.A. konvencie ligita kun SAT, d) unu membro de ĉiu fako (Administracio, Literatura Sekejo, ktp) funkcianta ekster la sideja urbo de SAT. La sekretario de la K.K. es-

tas ankaŭ sekretario de la Ĝ.K.-aro kaj funkciigas tiun organon. Ĉiu konsilanto estas elektata de la tuta anaro.

16. La Ĝ.K.-aro helpas al P.K. per siaj informoj kaj konsiloj. Ĝi plie observas kaj kontrolas la agadon de la P.K. Se la Ĝ.K.-aro rimarkas, ke tiu agado ne estas honesta kaj laŭstatuta, ĝi rajtas konigi siajn konstatojn al la tuta membraro per la presorgano. La Ĝ.K.-aro prezentas raporton antaŭ ĉiu Kongreso. Ĝi rajtas demandi al la P.K. pri ĉiuj aferoj kaj postuli respondon.

KONFLIKT KOMISIONO

17. La Kongreso elektas K.K. konsistantan el 3 membroj (loĝantaj en la sama loko), kies tasko estas esplori kaj laŭeble solvi la konfliktojn inter la membroj kaj se necese proponi eksigojn (vidu nr-on 7).

La 6^a paĝo de la
Statuto de SAT